



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 2
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
30-a (37-a) jaro
Monata

Kongressen i Tokio 1965

Første anmeldelsesperiode forlenget.

Vi har tidligere gitt opplysninger om den fellesreisen som det svenske reisekontoret RESO (i samarbeide med UEA) vil arrangere til verdenskongressen for Esperanto i Tokio i 1965. Nylig har også UEA i bladet ESPERANTO gitt opplysninger om den fellesreisen som arrangeres fra Rotterdam.

I prisen fra RESO er iberegnet også hotell og frokost i kongressuken foruten fullt opphold i dagene før kongressen og noen rundturer i disse dagene. Reiseleder til disposisjon.

RESO arrangerer reisen med en maskin av typen DC 8 JET, som flyr fortere enn UEA's DC 7 C og med et minimum av landinger.

UEA's maskin flyr den sydlige vei, men flyr meget høyt. Det blir nesten ingen mulighet til å se noe av landene underveis, man får ikke forlate flyhavnene hvor man lander.

Ved UEA's alternativ må man legge til reisen til Rotterdam (eller en annen vesteuropeisk by). RESO flyr fra København—Stockholm.

Som nevnt før, er RESO's plan at man kommer til Tokio noen dager før kongressen og får tid til å akklimatisere seg og gjøre rundturer i byen, så deltar man i kongressen (en uke), og bruker resten av tiden til å se Japan, delta i etterkongress-turer osv. Programmet er ikke ferdig ennå.

For å få et inntrykk av interessen for denne fellesreisen, ber vi *alle som bare tenker på å dra til Tokio* med den skandinaviske fellesreisen, straks å melde fra til Norsk Esperanto-Forbund. Dette er selvsagt ikke på noen måte bindende. Vi oversender, så opplysninger om interessen i Norge til RESO.

RESO vil sende opplysninger, og de som ønsker det, kan spare penger hos RESO, hvor de vil bli satt i bank til høyest mulig rente.

Første periode (laveste kontingent) for anmeldelse til kongressen er forlenget til 31. juli 1964.

De som *tenker på* å reise til Tokio, bør altså:

- a) skrive til Norsk Esperanto-Forbund *snarest* hvis man er interesseret i RESO's fellesreise.
- b) be om «aliĝilo» fra Turisma Servo de NEL, og eventuelt melde seg innen 31. juli 1964. Inntil da gjelder følgende kontingenter:

Vanlig kongressdeltager ..	kr. 90,—
Ektefelle	» 45,—
Ungdom (inntil 20 år)	» 34,—
Student (inntil 30 år)	» 56,—
Blind kongressdeltager	» 45,—

I vår forrige meddelelse (Norvega Esperantisto nr. 9/10 1963) var andyet summen n.kr. 5350, da var ikke medregnet hvad man måtte bruke i dagene efter kongressen, da man skal bese Japan. Vi er blitt bedt om å antyde en totalsum for hele turen, alt inklusive, og vi vil da antyde n.kr. 7000, men det blir jo avhengig av hvad hver enkelt vil bruke på å se Japan i dagene 8.—20. august.

Verdenskongressen i Tokio i 1965 er allerede aktuell. Det er et faktum. Og for at vi best skal kunne arrangere fellesreisen, er det absolutt nødvendig at alle som *tenker på* å bli med, alt nu gir oss beskjed om det, så vi får et inntrykk av interessen og kan beregne og planlegge på et visst grunnlag.

C. Støp-Bowitz.

HELSINGØR

invitas vin pasigi ferian semajnon en La internacia Altlernejo 19.—26. julio inter samideanoj el multaj diversaj landoj. — Petu senpagan prospekton

ĉe **L. FRIIS**
Ingemannsvej 9
Abyhøj, Danlando

Informoj

de la Ekzamena Komisiono

Ordinaraĵ printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1964. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Stavanger, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1a de Majo*. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo. Poŝtĝirokonto 100 34.

BERGEN: S-ro Kjell Offerdal, Monrad Mjeldes vei 2, Melkeplassen, Bergen.

HAUGESUND: S-ro Olav Thormodsen, Boks 132, Haugesund.

SARPSBORG: S-ro Johan Hammond Rosbach, C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg.

SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkeveien 50, Sauda.

STAVANGER: S-ro Trygve Kvalvåg, Oddehagen, Hafrsford.

TROMSØ: S-ro Arne Høgseth, Sjøgate 5, Tromsø.

TRONDHEJMO: S-ro Ragnv. Rian, Boks 109, Trondhejmo.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz,
Prezidanto

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

HAGO

La ĉijara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Hagó. Tion scias ĉiu esperantisto.

Nederlando ne estas timige malproksima lando por norvegoj — tial kompreneble ankaŭ ne ekzotika aŭ tre fremdeca.

La norvegaj esperantistoj devas kapti la okazon por vojaĝi al la Kongreso. Neniu scias, kiam la Universala Kongreso denove estos tiel proksima kiel ĉijare. Kaj kvankam Nederlando ne estas tre fremdeca, ĝi estas tre interesa lando, tion scias ĉiu, kiu iam estis tie. Nederlando estas vidinda kaj vizitinda, revidinda kaj revizitinda.

Evidente la esperantistoj scias tion, ĉar la Bultenoj informas pri rekorda aliĝado al la Kongreso — eĉ pli ol pasintjare.

PRO MERITO

Okaze de la fondiĝtago de N.E.L., la 27. de Januaro, la Ordena Kolegio decidis doni al nia pioniro *Ragnvald Rian* la gradon *Granda Kruco* de la ordeno Pro Merito.

La Ordena Kolegio
C. Støp-Bowitz
Majstro

Sciigoj de N.E.L.

Taskotabelo por la kluboj. — *Marto:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon.

La Estraro.

Tre favora oferto!

La Eldonejo Dreyers forlag, kiu en 1959 eldonis, sub la titolo «Ludwik Zamenhof, skaperen av Esperanto», norvegan tradukon de la fama verko de Edmond Privat «Vivo de Zamenhof», faritan de Trygve Raimar, nun informas ke ĝi ankoraŭ havas kelkajn centojn da ekzempleroj de la libro.

La eldonejo nun decidis proponi la restantajn ekzemplerojn de tiu tre valora kaj interesa libro al la membroj de NEL kaj al la legantoj de Norvega Esperantisto por la eksterordinare malalta prezo de nur *kr. 3,00* (origine ĝi kostis kr. 11,00).

Se oni sendos kr. 3,00 rekte al Dreyers Forlag, Arbiensgt. 7, Oslo, la eldonejo sendos la libron senkoste. Se oni petos ĝin kontraŭ poŝtrepago, oni devos pagi ankaŭ la afrankon.

Ni proponas al la klub-estaroj kolekti mendojn de la membroj, kaj ensendi amasendojn. Tio ŝparas laboron al la aĉetantoj kaj al la eldonejo Dreyer. Sed ne tro longe prokrastu vian mendon, alie vi riskos ke la libro estos elĉerpita.

Ni tre rekomendas al ĉiuj esperantistoj utiligi ĉi tiun okazon havigi al si kelkajn ekzemplerojn de ĉi tiu sola norveglingva libro, kiu donas vastajn informojn pri Esperanto kaj

ĝia kreinto. Ĝi estas tre taŭga donaco al viaj amikoj kaj al ĉiuj, kiujn vi deziras informi pri nia lingvo.

La Liga Estraro de N.E.L.
C. Støp-Bowitz,
prezidanto.

EL POPOLA ĈINIO

estas senpage ricevebla dum 1964 por ĉiuj Esperantaj grupoj, kiuj sciigas al ni sian deziron kun indiko de (1) nomo kaj adreso de la grupo (preslitere); (2) nombro de la membroj; (3) nomo kaj adreso de la prezidanto aŭ sekretario; (4) se estas biblioteko, ankaŭ nomo kaj adreso de la bibliotekisto. La sola devo estas elmontri la ricevitaĵajn gazetojn dum la kluba kunveno aŭ alimaniere al la membroj. Skribu tuj al

ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Paska Kultura Semajno en la Kastelo de Grésillon

De la 31a de Marto ĝis la 7a de Aprilo okazos, sub la aŭspicioj de la Franca Ministerio pri Edukado, Internacia Kultura Semajno en la Kastelo de Grésillon par Baugé (Maine et Loire).

Prelegos: Prof. D-ro Ivo Lapenna, D-ro Albault, Prezidanto René Llech-Walter, kaj diversaj membroj de la konsilio de U.F.E.

Konversaciaj kursoj, ludoj kaj distraĵaj vesperoj.

Dimanĉo 5a de Aprilo okazos vizito en la Kasteloj de la Loire.

Petu klarigojn pri la kostoj de la restado kaj rezervado al S-ro Micard, Instruisto, Epineux le Seguin (Mayenne) — Francujo.

Afiŝ-kampanjo en Bergen

Raporto pri la kampanjo per la UNESKO-afiŝoj kun Esperanto-teksto

Por nia propaganda laboro dum la aŭtuno 1963 en Bergen ni havigis la serion de afiŝoj pri la homaj rajtoj, kiun UNESKO eldonis kun la tekstoj en Esperanto.

Estis granda ĝojo vidi kiel grandiozaj estas tiuj afiŝoj. Devus esti grava tasko por ni ĉiuj vaste utiligi ilin, metante ilin en ĉiajn strategiajn lokojn. Tio sukcesis al ni ĉe la jenaj instancoj: Stacidomo, Urba Biblioteko, Universitata Biblioteko, Norvega Komerco-Altlernejo, Porinstruista Lernejo, Ŝtata Gimnazio, Gubernia Gimnazio, 3 urbaj gimnazioj, 1 gimnazio de la urba ĉirkaŭaĵo, kaj 1 mezgrada lernejo. Komerca Gimnazio kaj 1 gimnazio de la urba ĉirkaŭaĵo rifuzis akcepti la afiŝojn.

Ne en ĉiuj lokoj, kie oni akceptis, la sukceso estis egale granda. Pro ia miskompreno la tekstoj fortondiĝis ĉe la Urba Biblioteko. Ne ĉiuj lokoj havis sufiĉe da spaco por kune elmontri 12 grandajn afiŝojn. Tiuj elektis unu aŭ kelkajn, aŭ metis ilin po unu aŭ du en la klasĉambrojn. Ni tamen supozas ke tia metodo ne kaŭzis oblikvan impreson ĉe la lernejoj, ĉar ili pli-malpli ekhavis scieton ankaŭ pri la ceteraj afiŝoj de la serio. Unukaze oni en lernejo pendigis «ŝlosilon» sub la afiŝo, sed post du tri horoj ĝi malaperis. Kelkaj lernejoj deziris havi tradukojn de la kapsentencoj, skribitajn sube per malgrandaj nigraj blokliteroj, kio espereble ne malbeligis la aspekton.

En la nuna stadio oni havas ankoraŭ okazon eluzi tiujn afiŝojn kiel propagandon por Esperanto, sed supozeble iom post iom ili estos tradukataj en la diversajn naciajn lingvojn, kaj tiam la Esperanta eldono ne plu estos same efika. A. K.

RECENZOJ

Stafeto reeldonas Engholm.

Stellan Engholm: Homoj sur la tero. 2a reviziita eldono. Enkonduko de Ferenc Szilágyi. Stafeto 1963. 236 paĝoj.

Mi bone memoras posttagmezon dum la milito. Mi — relative nova esperantisto, malriĉa gimnaziano — iris al la tro kaŝita muzika vendejo de Ragnvald Rian. Kiam mi demandis pri aĉeteblaj esperanto-libroj, li havigis el la malantaŭa ĉambro pakaĵon, kaj mi povis elekti.

Nu: La monujo parte decidis la elekton. Sed mi ne pentis. Mi elektis libreton de Engholm, Al Torento. Kaj post la milito, kiam aperis lia «Vivo vokas», mi tuj havigis ĝin. Poste mi ekkonis «Malgrandan Revuon» — kaj abonis.

Kial? Kompreneble ĉar Engholm donis ion pere de siaj libroj kaj revuo. Li volis ion. Kaj la junulo ŝatis lian mezaĝon.

Nun lia «Homoj sur la tero» reaperas. Ni sekvas en ĝi la bienon «Novponto» sub tri generacioj, la maljuna Kristoforo, lia samnoma filo kaj la nepo Eskil. Kaj Szilágyi asertas en sia enkonduko, ke la tero, la bieno estas la ĉef-«persono», ne la tri generacioj de terkulturantoj. Mi ne tute samopinias. Vere, la tero ludas gravan rolon. Sed mi kredas, ke la mesaĝo — kaj tial la «ĉefpersono» — estas la laboro.

La maljuna Kristoforo estis feliĉa viro. Li posedis sian bienon, li posedis siajn revojn — kaj el la revoj li kreis sian vivon, sian laboron. Dum Kajsa — la edzino — prizorgis la laboron.

La juna Kristoforo ankaŭ havis siajn revojn. Sed tiuj revoj estis tiaj, ke ili ne povis krei feliĉon — ĉar ili estis la revoj pri senlaboreco. Kaj li ne komprenis, ke tio estis revoj pri

malpleno. Li forvendis la teron, kaj tiel havis nek bienon, nek laboron, nek revojn. Lia vivo estis la vera malpleno.

Sed Eskil retrovas la laboron.

Pri amo la libro preskaŭ ne rakontas. Viroj kaj virinoj renkontiĝas, konatiĝas, eĉ edziĝas. Tamen — ankaŭ tiurilate la libro priskribas kiamaniere malpleno povas ekzisti. Same kiel tiuj tri viroj rilatas al la laboro, same al la virino: La maljuna Kristoforo vivas kune kun sia Kajsa kiel kun la bieno: Ŝi apartenas al li, sed lia ĉefokupo estas en alia loko, kaj li tamen feliĉas. La juna ankaŭ edziĝas, sed pli el neceso. Kiel la laboro tamen montriĝas necesa — kvankam li ne ŝatas ĝin — Selma estas lia edzino, kvankam li ne amas ŝin. Nur por iom plenigi la malplenan. Nur Eskil — kiu retrovas la laboron, ankaŭ retrovas la amon.

Haro.

Riĉa libro

Jean Ribillard: Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud. Stafeto 1963. 144 paĝoj. Originale en Esperanto.

Ĉi tiu libro finiĝas per: «alia subite ektrotis kun sia pasaĝero skuadita kaj»

Sinjoro Ribillard do ne finskribis ĝin antaŭ sia morto. Sed kial eldoni nefinitan libron? Kaj de homo, kies nomo oni apenaŭ konas? Vere, li jam eldonis libron «Vagado sub palmoj», sed kiu atentis pri ĝi?

Tamen mi kuraĝas diri: Stafeto prave agis, eldonante ĉi tiun libron. Vi ĝuos la legadon ek de unua momento — se vi ne estas mense mallaborema. Se studrondo de nekomentantoj bezonas konvenan literaturon, mi ne hezitas diri: Prenu ĉi tiun libron! Vi ne trovos pli konvenan!

M'Saud estas azeno, kaj tiu azeno priskribas sian vivon inter la homoj. Verdire, la azeno estas sklava besto,

sed precipe la sklavo atentis pri la malfortaj flankoj de la homa menso. Kaj tiel kreiĝas satiro leginda, ĝuinda.

Sed ne kredis, ke vi facile venos al la ĝuo. Ribillard estas homo kiu posedas klasikan edukon, abundan legadon — kaj li ĉerpas el tiuj fontoj. Kaj tiu studrondo (aŭ unuopulo) kiu elektas la libron por studo, ricevos ne nur lingvan studmaterialon, sed ankaŭ mitologian, historian, geografiajn ktp.

Al tia enhavo decas riĉa lingvo. Kaj Ribillard posedas vortrezoron superan al la kutima, ordinara. Ofte li uzas neologismojn — sed kiel la glosaro je la fino de la libro montras, la plej multajn li ĉerpis el aliaj fontoj. Ordinare oni devus, laŭ mia opinio, uzi la ĉiutagan Esperanton, sen neologismoj. Sed al verko kia tiu estas, oni ne povas doni tiajn limojn. Tamen: Vortoj kiaj «bifteko» por «bifstekoj» kaj «distrito» anstataŭ «distriktoj» ŝajnas ne nur nenecesaj, sed invitas al miskompreno. -teko ja (vidu PV) havas signifon de ujo, kaj -it estas partecipa finaĵo.

Do: Al tiuj esperantistoj kiuj emas lerni pli, mi diras: Prenu la libron, sed kunprenu vortaron. Kaj ne sidu tro fore de konversacia leksikono. Al tiuj, kiuj jam perfekte konas nian lingvon, mi diras: Prenu kaj frandu!

Haro.

3 religiaj libroj

Papo Johano XXIII: La surtera paco. IKUE-kajero 3. — Eldonis Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista 1963.

La unua el la tri religiaj libroj, kiujn ni hodiaŭ pripraktos, estas la plej modesta laŭ eksteraĵo, tamen la plej grava. Plej grava, ne nur, ĉar la aŭtoro havas pli da aŭtoritateco, sed ankaŭ pri sia enhavo — ĝi estu

verkita de kiu ajn. Temas pri papa letero, «Pacem in terris», oficiala encikliko. Kvankam tia letero ne estas «parolo ex cathedra», kaj tiel, laŭ la katolisismo, «senerara», ĝi estas tiom grava, ke ĝin rezenci laŭ ordinara maniero ŝajnas neeble. La papo montras al la vojo, kiun la mondo devas, laŭ lia koncepto, iri por atingi la pacon kaj unuecon. Por ni, protestantoj, estas interese vidi la vojon al religia unueco: «La katolikoj ĉiam zorgu, esti konsekvencaj kaj ne toleri kompromisojn, kiuj endanĝerigas la purecon de la religio aŭ de la moralo...»

La kajero, kiu enhavas vere saĝajn kaj legindajn eldirojn, havas latinan antaŭparolon kaj estis disdonata dum la vatikana konsilio pasintjare, por montri al la «sanktaj patroj» la utilon kaj taŭgecon de Esperanto, la moderna latino.

Martinus: «Logiko» kaj «Internacia mondrogno kreiĝanta», ambaŭ eldonitaj de Martinus-instituto Kopenhago, 1963.

La plej granda el la duoj estas unu el la bazaj verkoj en la verkaro de la dana religio-filozofo Martinus, kaj la oka en esperanta vestaĵo. Ankaŭ en tiu libro Martinus laboras laŭ sia «sciencia» vojo, kaj celas montri la tutan eston laŭ tiu sia logiko. Estas neevitinde, ke li kolizias, kun la religiaj konceptoj — kaj li mem diras: «La religia mondkoncepto estas nesciencia tiel longe, kiel ĝi estas nur kredo kaj aserto» - kaj li tial postulas logikon, logikon kaj ree logikon. «Ĉiu neado ne bazita sur pruvoj estas sensenca parolo,» li diras, «ĝi estas dogmo de kredo same kiel la senpruva agnosko. La evoluinta, vere science sintena homo ne povas vivi sur kredo. Li serĉas pruvadon por ĉiu rekono.» Bedaŭrinde nur estas, ke Martinus mem forgesas tion, kiam

li preparolas la kristanismon, tiam sufiĉas la onidiroj, la miskomprenoj, kaj li ne serĉas la kristanismon mem. Pro tio lia verko ŝancelas. Ekzemple la frazo: «Troveblas eĉ pastroj, kiuj benas la militon kaj ĝiajn murdilojn» estas ofte ripetata aserto, sen iu bazo en pruvoj. Kaj «La ekleziuloj ja instruas, ke laŭ decido de la Providenco la nomita terhomido estos «eterne torturata sen ia eblo por liberiĝo...» estas ekzemplo de la «popularaj miskomprenoj», kiujn li akceptis, sen esplori, ĉu veraj aŭ ne.

Tio estis al mi granda enigmo, ĝis mi en la alia libro, kiu enhavas nur unu ĉapitron el la ĉefverko «Livets Bog», la libro de l' vivo, vidis jenon: La libro estas eldonita, verkita, en la komenco de la 1930-jaroj! Kaj la leganto de ambaŭ libroj atentis je tio, sen tio oni ne povas kompreni ion ajn!

La libro — kiel tiu tempo ja emis — rigardas antaŭen al la tempo, kiam la ŝtato ĉion posedas kaj ĉion decidigas, kiel al la glora estonteco. La «privata posedaĵo» estas malutilo, en la perfekta socio, al kiu ni iros, ĉiu ricevas laborkvitancojn, kaj interŝanĝe kun tiuj ricevas la vivnecesajn aĵojn. La edzo ne plu laboras por sia familio, nur por si mem, kiel ankaŭ la edzino, kaj la ŝtato nutras kaj vartas la infanojn.

Vere strange estas legi (verkita ĉ. 1930!): «La nuna spirita fundamento de la homaro, la tri mondreligioj, eliris de tia impulso nun malfortiĝanta, kaj nova impulso tial progresas. Ni vidas, ke la teraj homoj nun travivas pereon de malnova mondkulturo kaj naskiĝon de nova.»

Kaj ni forte esperas, ke tiu «nova mondkulturo» por ĉiam mortis, kaj ke la «malfortiĝanta» tamen plue vivos, je beno de ĉiuj.

H. A. R.

Gevaert foto-konkurso

okaze de la 49a Universala Kongreso kaj la 20a Internacia Junulara Kongreso ebligas al ĉiu foto-amatoro gajni grandiozajn premiojn. Li aŭ ŝi simple produkti la plej bonan foton pri la temo el la Taglibro de Anne Frank: «Freneze mi amas la naturon, ĉu nur pro tio, ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi la nazon eksterne?»

Kompletan regularon vi trovos sur aparta folio en la Esperanto-gazetaro, aŭ vi ĝin petu ĉe la 49a UK aŭ 20a I.J.K.

La ĉefa Gevaert-premio estas beluga medalo kaj 400 ned.guld.; krome Gevaert disponigas por la plej sukcesinta juna fotografo (sub 26 jara) medalon kaj 200 guldenojn!

Butikistoj, fotovendejoj kaj aliaj esperantistoj kiuj regule kontaktas la publikon bonvolu mendi kvanton da folioj por disdonigo al ne-esperantistaj klientoj kaj konatoj. Ankaŭ tiuj partoprenu, kaj vole-nevole interkonatiĝu kun Esperanto!

PETU PROSPEKTON PRI



ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND

VINCAS PIETARIS:

Sorto de malnoblulo

El la litova tradukis Kl. Naudzius (daŭr.)

Pasis ne du, ne tri, sed kvar tagoj. Frumatene revenis Johano lacega, pala, sed gaja.

— Kio nun okazos al vi? malneglekte demandis lin Elze.

— He nenio! Ĉio estas bona! Kred-eble, ke Dio helpos profiti.

— Ho, dank' al Dio, fine ankaŭ nin Dio ekkompatos, kun ĝemspiro rediris la edzino kaj, kvazaŭ senkonscie, ŝia manŝto faris krucsignon kaj la lipoj eldiris preĝon.

Post matenmanĝo Johano iom ekdormis kaj poste foriris vilaĝon kaj la tutan tagon ne estis hejme. Li ankaŭ paŝis tra la ĉirkaŭa regiono tutan tagon.

— Por kio, Joĉjo, vi tiel piedas? Jam du tagojn... , suspekteme demandis Elze la edzon, revenintan por tranokti.

— Jen por kio! respondis ĉi tiu kun rideto kaj el sub la bosko montris du preĝlibrojn.

La edzino paliĝis kaj iom ektimis, ĉar nun ŝi divenis kie kaj por kio forestis ŝia edzo.

— Joĉjo, ĝi estas tre danĝera afero, ŝi diris sidiĝante sur la benko, ĉar sentis, kvazaŭ io senfortigis ŝiajn krurojn.

— Nu jam, nu jam, ekparolis Johano, rimarkinte la paliĝon de la edzino. — Kia do estas ĉi tie danĝereco. Kiam oni faligas arbon aŭ laboras ĉe maŝinoj, ĉu ne estas danĝere, kaj tamen oni laboras. Mi aĉetis ok librojn, kaj nun, kiel vi vidas, restis nur du, pluparolis Johano, dezirante distrigi la edzinon, — kaj ĉu vi scias kiom da mono mi perlaboris?

— He, forestu tiu profito, Joĉjo-

— Sed vi aŭskultu! Por ses libroj mi ricevis naŭ rublojn. Por tiuj ĉi

du mi gajnos ne pli malmulte ol po rublo: estos dekunu.

— Joĉjo, Joĉjo! plorante parolis Elze, — mi bezonas nek dekunu, nek naŭ!

— Silentiĝu, malsaĝulineto! trankviligis ŝin Johano.

Sed multe li devis peni, ĝis kiam li konvinkis ŝin kaj trankviligis.

Tiamaniere Johano komencis portadi la malpermesitajn librojn. Pasis unu jaro kaj alia. Dumsomere Johano laboris, vintre, ne havante laboron, portadis la librojn kaj per tio havigis al si panpecon. Fine ankaŭ Elze al-kutimiĝis toleri la libroportadon.

— Per tio al neniu li kaŭzas dom-aĝon, parolis al si la edzino, — neniu povas plendi je li.

Havante panpecon por si kaj por la ido, ili dankis Dion.

— Ne multe ni bezonas: panpecon kaj varman loĝangulon por ŝirmi sin. Dio donas al ni tion, kaj ni dankas Dion.

Antaŭtage antaŭ la granda fasto, malsobra Jurgela jam estis veturonta el la urbo hejmen, sed jen li renkontis surstrate Johanon Bevuogis.

— Ha, estu sana! ha, Bevuogis. *Koĉ vudki dam!* (Venu, mi donos brandon!), parolis la sinjoro komunumestro.

— Dankon! respondis Bevuogis — Mi ne drinkas.

Ankaŭ Bevuogis iom komprenis la polan.

— *Ale koĉ* (Sed venu), se mi ordonas! ne ĉesis sinjoro Jurgela, intermiksante du lingvojn.

— *Koĉ!* ĉiam pli laŭte li kriis.

— *Ja vujt, to mogu* (Mi estas komunumestro, tial mi povas) ordoni, *a ti doljen slukaĉ...* *Muviem koĉ to i*

koĉ (kaj vi devas obei... Mi diras venu do venu) ... , li kriis, kaptante Bevuogis'on ĉe la nuko kaj puŝante lin tien kaj reen. La skuata viro longe pardonpetis, longe penis malkonsili, tamen vane: ju pli longe, des pli la sinjoro komunumestro koleris, fine li komencis Bevuogis'on bati.

Ofendita Bevuogis ne eltenis kaj puŝis Jurgela'on for de si. Tiu falis surnazne en la koton antaŭ la drinkejo kaj ekkriis:

— *Karaul!* (Gardo!)

Al la krio alkuris du policistoj.

— Kio okazis ĉi tie?

— Ho, la ribelanto, la mortiganto! kriis Jurgela, per la fingro montrante al Bevuogis, kiu rapidis eliri el la urbo. — Kuratingu lin, li estas kontrabandisto kaj hejme havas kontrabandon. Li portas la librojn el Prus-ujo.

Ĉu Bevuogis aŭdis ĉi tiun akuzon de Jurgela, ĉu ne, tamen li ekkuris.

— Haltigu! haltigu! kriis Jurgela, vidante, ke Bevuogis povas forgliti. — Haltigu, aliel li rekuras hejmen kaj forkaŝos la librojn.

Al la policistoj oni ne bezonis ripereti. Tamen ankaŭ Bevuogis ne bezonis instigon. Se unuj arde pelis, do la alia ankoraŭ pli arde kuris kaj forkuris.

La ambaŭ policistoj, ne kuratinginte, revenis sufoke spirante. Jurgela, kota kaj malsobra, sidis en la kaleŝo kaj atendis ilin.

Baldaŭ la du policistoj kaj Jurgela galope veturis por traserĉi la linsekigejeto de Bevuogis.

La mizerulo ne havis tempon por rekuri hejmen, kvankam li tre rapidis. Kiam li revenis, Jurgela jam fingrepikis kvin preĝlibrojn, serĉtrovitajn post la forno, fuŝvoĉe kriante:

— Ĉu mi ne diris! ĉu mi ne diris!

Bevuogis estis arestita kaj ekzilita por du jaroj. La edzino kun la infano restis en la linsekigejeto. Sed kiel ili

restis? Sen nutraĵo, sen hejtligo kaj sen konvena vestaĵo. Bevuogis havis dekkvin rublojn da mono, tamen dum la traserĉo ili malaperis nesciate kien, kvazaŭ fordronis en la teron. Tiel eĉ ne groŝon ŝi povis trovi. Post du tagoj la mizerulino devis iri por almozpeti — por ke ŝi povu savi kontraŭ malsato ŝin mem kaj la infanon.


Stariĝinte fojon sur la glita vojeto, nun Jurgela jam ne plu kapablis halti. Unu kaj alia el inter la najbaroj malbondezire rigardis al li koncerne la Bevuogis'on, al unu kaj alia li ekintencis venĝi pro tio. Kaj li akuzis ilin (pro tiu sama presita vorto en la gepatra lingvo). Poste venis intenco akuzi ankaŭ aliajn najbarojn, konatulojn... Eĉ la fingroj de la skribisto rigidiĝis, senĉese skribante plendojn.

Tamen ĉio tio ĉi ne konsolis la sinjoron komunumestron. En lian kapon senĉese penetris penso pri Bevuogis, precipe pri lia infano, pri la edzino, restita sen ia ajn apogo. Ankaŭ lin baldaŭ atingis la sciigo, ke Bevuogis-edzino iras almozpetante. Post ĉi tiu sciigo venis la alia — ke ŝi malvarmumis kaj ekmalanis ardan febron... Nun Jurgela, veturante el la urbo, ĉiam strebis veturi hejmen je alia vojo, sed ne preter la linsekigejeto de Bevuogis.

Estis la dua dimanĉo de l' fastotempo. La sinjoro komunumestro malsobra venis hejmen el la urbo. Kaj jen li rigardas — la ĉevaloj haltetaras. Ĉe la linsekigejeto de Bevuogis, laŭlarĝe de la vojo, de neniu traveturita, la vento kunŝutis larĝan kaj altan neĝamason. Li rigardas: jen la muroj de la linsekigejeto estas per neĝo superŝutitaj preskaŭ ĝis la fenestroj, ankaŭ la pordo estas superŝutita. La ĉevaloj, profunde envadintaj en la neĝamason, haltis. Komence Jurgela kvazaŭ ektimis, konstatinte, kie li sin trovas.

(*Daŭr.*)

På norsk



Europeisk Esperanto-konferanse
i Wien 1965

De esperantister som ikke kan delta i Verdenskongressen i Tokio i 1965, kan reise til Wien, der det i dagene 18. til 24. juli holdes en Esperanto-konferanse. Temaet for konferansen er Esperanto i økonomi, politikk, arrangementer og turisme. Som alltid ved Esperanto-tilstelninger vil det bli rik adgang til utflukter og samvær med andre esperantister.

Internasjonalt kursus i Zagreb.

Hvert år holdes det i universitetsbyene i Jugoslavia Esperanto-kurser under ledelse av universitetsprofessorer. I et kursus som nylig ble holdt ved universitetet i Zagreb, deltok studenter fra 14 oversjøiske land: Burma, Indonesia, Libanon, Syria, Israel, Irak, Jordan, Sudan, Tanganyika, Mali, Den forente arabiske republikk, Cuba, Bolivia og Chile.

I Centre d'Etudes nucléaires
de Grenoble,

den franske stats organisasjon for forsøk med atomenergi, er det dannet en Esperanto-avdeling, og det Internasjonale Språket har dermed oppnådd å bli anerkjent i vitenskapelig miljø som en seksjon med offentlig støtte. Denne seksjon er en utpreget service-avdeling som tar seg av informasjonstjeneste og oversettelser, og som også bygger opp et bibliotek. 50 personer ble med fra starten, blant dem flere medlemmer av Euratom. Redaktørene av de to kjente vitenskapelige tidsskrifter «Nucleus» og «Chimie analytique» tar nu imot artikler også på Esperanto.

«Monda Kulturo»

heter et internasjonalt tidsskrift for litteratur, film og teater. Dette tidsskrift utgis av Universala Esperanto-Asocio, og redigeres f.o.m. 1964 av dr. A. Albault, Toulouse, som er medlem av Esperanto-Akademiet. — «Monda Kulturo» har ikke samme karakter, men heller ikke samme intensjoner som Nica Literatura Revuo hadde, men vil likevel kunne fylle ut det store tomrom etter dette tidsskrift.

I Israel

finnes det nu Zamenhof-gate i følgende byer: Tel-Aviv, Jerusalem, Haifa, Holono, Herzlija, Kvar-Ata, Kfar Saba, Hirjat, Bjalistok og Bat-Jam.

Mer enn 300 unge japanere

har begynt å lære Esperanto med henblikk på verdenskongressen i Tokio i 1965.

Esperantos litteratur vokser.

Det er vanskelig å si hvor mange verker det finnes på Esperanto i dag. Det britiske Esperanto-forbunds bibliotek i London tallet i 1946: 28 060 forskjellige verker. I dette tall er tatt med en samling på 300 litterære tidsskrifter.

Ifølge en nylig utgitt bibliografi fra «Sentret for forskning og dokumentasjon» er det fra mai 1945 til mars 1952 utkommet 475 verker pluss aviser og tidsskrifter. Siden 1952 er tempoet stadig øket. Man må beundre denne virksomhet når man vet at den er realisert uten finansiell støtte, og utelukkende takket være folk som kan Esperanto og som bruker tid, penger og krefter til Esperantos litteratur.

Du poemoj de Sigbjørn Obstfelder

KNABINOJ

La arbaro zumas.
Kial zumas ĝi?
La rivero kantas.
Kial kantas ĝi?
Paĉjo dormas.
Panjo legas.
Sed mi, mi volas iri remi.

... Fjordo tiom bela!
Sopiras kial mi?
Fumo! — ĉe la istmo —
Jen la vaporŝip!
Nestun, Arvig,
Berle, Tangen.
Mi tamen volas iri ludi.

... Tiom multaj revoj.
De kie ili venas?
Ĉu lule de l' arbaro
al la Malsaĝulo?
Malsaĝulo.
Malsaĝulo.
Ne estos tio ia «Elfodanco»!

Dio, kiel bone!
estas tiom bone!
Neniu povas ja vivi
sen la tonoj, ĉu?
Unu... du kaj...
unu... du kaj...
Mi dubas, ĉu ekzistas elfoj?

... Jen maldekstra flanko.
Tie estu ĝi.
Ĉu en brust' ĝi batas?
Ĉu horloĝo nur?
Unu du kaj
unu du kaj —
Mi vere kredas nun, ke
mankas al mi kor'.

... La arbaro mutas.
Kial mutas ĝi?
— Estas tro izole
ĉi en Furulund!
Kaptito... birdo...
solaj... sidas...
Mi ne eltenos tion plu!

Trad.: LKH

MI RIGARDAS

Mi rigardas ĉielon blankan,
mi rigardas grizbluajn nubojn,
mi rigardas la sangon sunon.

Tio do estas la mondo.
Tio do estas hejmo de l' globoj.

Pluva guto!

Mi rigardas la altajn domojn,
mi rigardas la multajn fenestrojn,
mi rigardas preĝejan turon.

Grizbluaj nuboj kolektiĝas.
Suno foriris.

Mi rigardas la belvestitajn virojn,
mi rigardas ridantajn virinojn,
mi rigardas klinantajn ĉevalojn.

Kiel la grizbluaj nuboj peziĝas.

Mi rigardas, rigardas...
Mi certe venis al malĝusta globo!
Ĉi estas tiel strange...

Trad.: LKH

Programo de la Kultura Semajno 1964

Organizita de Franca Unio por Esperanto sub la aŭspicioj de Ministerio pri Nacia Edukado en la kastelo Grésillon de 31/3 ĝis 7/4.

mardo 31/3:

alveno de la partoprenantoj kaj interkonatiĝo.

merkredo 1/4:

9 h: S-ro Ribot: Pedagogia valoro de Esperanto. 11 h: kurso kaj konversacio. 17 h: D-ro Lapenna: «Grandaj klasikaj lingvoj». 21 h: S-ro Blanc: Bulgario, Malnova Fajrujo kultura en Balkanoj» per diapozitivaj kunsonbendo sinkronigita.

Ĵaŭdo 2/4:

9 h: D-ro Lapenna: «Retoriko». 11 h: kurso kaj konversacio. 17 h: ludoj en Esperanto. 21 h: S-ro Blanc: «Kutimoj kaj Tradicioj el Oriento» per diapozitivaj kunsonbendo sinkronigita.

vendredo 2/4:

9 h: D-ro Albault: «Esenca organo: la okulo». 11 h: kurso kaj konversacio. 17 h: S-ro Frangeul: «UNESKO». 21 h: S-ro Rousseau: «Malmö-Parizo» per diapozitivaj.

sabato 4/4:

9 h: S-ino Cheverry: «La Mezepoka fortikaĵo en iama socia vivo, tipa ekzemplo: Angers» per diapozitivaj. 11 h: kurso kaj konversacio. 17 h: ludoj en Esperanto. 21 h: S-ro Guillaume: «Unu monaton ĉe la bordo de Nilo» per diapozitivaj.

dimanĉo 5/4:

ekskurso al la kasteloj de Loire.

lundo 6/4:

9 h: S-ro Motillon: «Leonardo da Vinci en Turanĝio». 11 h: kurso kaj konversacio. 17 h: ludoj en Esperanto. 21 h: S-ino Cheverry: «De historio al legendo en «Loire-Valo» per diapoz.

mardo 7/4:

9 h: S-ro Llech-Walter: «Pedagogio de la Publikaj Kursoj». 11 h: kurso kaj konversacio. 17 h: S-ro Thierry: «Originalaj romanoj aperintaj en Esperanto». 21 h: S-ro Blanc: «Centra Francio, kia ni prezentis ĝin en Bulgario» per diapozitivaj kunsonbendo sinkronigita.

Kultura gvidado: René Llech-Walter, 5 quai Vauban, Perpignan, (P.O.) Francujo.

Pedagogia gvidado: Roger Blanc, Instruisto, Sancoins (Cher), Francujo

Administrado: Henri Micard, Honora Instruisto, Epineux-le-Seguain (Mayenne) Francujo.

49-a Universala Kongreso de Esperanto

DEN HAAG, 1.—8. Aŭgusto 1964

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando

DUA BULTENO

Al ĉiuj aliĝintoj estas sendita la Dua Oficiala Bulteno de la 49-a U.K. En ĝi troviĝas ĝeneralaj informoj pri la Kongreso, ties kompleta provizora programo, programoj de la Infana Kongreseto, Cseh-Seminario, Junulara Kongreso, Antaŭ- kaj Postkongresoj, plenaj informoj kun mendilo pri loĝado kaj ekskursoj. En la Dua Bulteno troviĝas krome i. a. informoj kaj regularoj pri la Oratora kaj Belarta Konkursoj. — La Duan Bultenon ricevas nur la aliĝintoj al la 49a U.K.

20-a TEJO-KONGRESO

Pro la limigita nombro da lokoj je dispono, la Organiza Komitato de la 20-a Internacia Junulara Kongreso instigas ĉiujn interesiĝantojn sendi sian aliĝon kiel eble plej baldaŭ.

Informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la adreso de la 49-a U.K.

ĜENERALAJ KUNVENOJ

Dum la 49-a U.K. okazos du ĝeneralaj kunvenoj: a) La rezultoj de la Junulara Jaro, b) Diskuto pri la Estrara Raporto; Raportoj de la fakaj asocioj pri la fakkunvenoj okazintaj dum la kongreso.

SEKCIOJ

Dum la 49-a U.K. estos du laboraj sekcioj, kies temoj estos: a) La eduka valoro de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj, b) Aplikado de modernaj metodoj en la informado pri Esperanto.

INTERNACIA EKZAMENO

Ankaŭ okaze de la 49-a U.K. okazos Internacia Ekzameno. Pri la kondiĉoj vidu la februaran numeron de «Esperanto», paĝ. 24.

FOTO-KONKURSO

Ni ankoraŭfoje atentigas ke la limdato por la sendo de la konkursaĵoj estas la 1a de julio 1964. Pri regularo kaj premioj vidu antaŭajn Oficialajn Komunikojn.

STATISTIKO

(ĝis 29/1-64): Argentino 3, Aŭstralio 6, Aŭstrujo 16, Belgujo 24, Ĉeĥoslovakujo 10, Ĉilio 1, Danlando 33, Finnlando 29, Francujo 180, Germanujo 120, Hindujo 1, Hispanujo 12, Hungarujo 78, Indonezio 1, Israelo 2, Italujo 44, Japanujo 6, Jugoslavio 53, Kuvajto 1, Luksemburgo 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 259, Norvegujo 11, Nov-Zelando 1, Pollando 119, Portugalujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 73, Svisujo 17, Usono 9, Venezuelo 2. — Entute 1559 el 37 landoj (pasintjare 1480 el 35 landoj).

20-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O.

Anne Frank Domo, Amsterdam,
8.—15. aŭgusto 1964

La Anne Frank Domo. Gvidataj vizitoj al la mallarĝaj ĉambroj supre, en kiuj vivetis la familio Frank sammaniere kiel miloj da aliaj, dum la krueblaj okupaciaj jaroj 1940—1945.

En la sekvanta tago la kongreson akceptos kaj rondveturadon donacos la magistrataro de Amsterdam. El blankaj salonboatoj vi admiros diversepokajn fasadojn, jen pompajn, jen ĉarmajn, el 1600 ĝis 1900. Vespere vi dumpromene ilin revidos enlumigitaj.

Postan tagon regalos nin la Amstelbierfarejo per... (neĝusta respondo!) ...per lunĉo kaj filmprogramo. La riĉan programon ebligis ankaŭ aliaj donacoj: de la ŝtato, de Internacia B(usiness) M(achine), de Nutricia laktofabro, kaj de aliaj.

Ne forgesu la afablan vilaĝon Broek (pron.: «Bruk»), kiu aranĝos tutan, oficialan festosemajnon dum la kongreso.

La arbaroriĉa regiono «Het Gooi» (do ne Alkmar) estos nia ekskursejo. Ĝi estas kvazaŭ la ĝardeno de Amsterdam. Hilversum estas ĝia centro, kie la fama urbdomo (vidu «Esperanto», jan 1964, p. 8) el 1927 (eble enhavanta akcepteman urbestron) kaj la AVRO-radio-ejo estos niaj viktimoj. Fine ni heroe invados la aŭtentikan kastelon de Muiden, plantante la Esperantoflagon sur la bastionoj. Jam en la 17-a jarcento tiu kastelo estis (kaj ĝis nun estas) kultura centro. Post nia vizito ĝiaj ruinoj maksimume estos vultura centro.

Almiksi al ĉi ĉio la ĝuon de interamika rendevuo, kaj rezulte jen revo pli ol rava. Estu bonvena!

P.S. Atentu la grandiozan *Gevaert* foto-konkurson pri temo de Anne Frank! Jam nun estas certe, ke belega fotolibreto akompanos la I.J.K.-kongreslibron.

KARUSELVOJAĜO

Kio estas karuselvojaĝo? Karuselvojaĝo estas tute nova sistemo de vojaĝo speciale por esperantistoj.

Prenu la geografian karton de Nederlando, Germanujo, Luksemburgo kaj Belgujo. Faru linion inter la urboj Amsterdam, Köln, Heidelberg, Luxembourg, Bruxelles kaj Amsterdam. Vi nun havas cirklon de vojo, kiun vi povas veturi per aŭtobuso. La esperantistoj, kiuj eksidas en la aŭtobuso en Amsterdam faras la rondon ĝis Amsterdam.

Por ili la vojaĝo finiĝas en Amsterdam. La vojaĝo tamen ne estas aranĝita nur por Amsterdamanoj. Ĉar la aŭtobuso daŭrigas sian vojon kaj faras sinsekve ses rondojn, aliaj esperantistoj, kiuj ekzemple dumvoje en Köln, Heidelberg, Luxembourg aŭ Bruxelles aliĝas, restas en la aŭtobuso. Dum la posta rondo ili vojaĝas ĝis la loko, kie ili komencis la vojaĝon. Ĉar la aŭtobuso faras ripetigantan rondvojaĝon, ĝi ricevis la nomon karuselvojaĝo.

Kiuj estas la avantaĝoj?

- Esperantistoj, kiuj ne povas partopreni internacian kongreson tamen povas esti en Esperantujo.
- la vojaĝkostoj ne estas influataj de reklamkostoj, ĉar la reklamado okazas pere de propraj revuoj, gazetoj kaj cirkuleroj.
- ĉar la partoprenantoj vizitas regule la samajn hotelojn, restoraciojn, vidindaĵojn, suvenir-vendejojn ktp. oni povas postuli la aplikadon de Esperanto.

d. la esperantistoj en urboj, kie ni tranoktas aŭ restadas, povas utiligi la viziton por siaj membroj.

e. la vojaĝo kontribuas al la efektiveco de la internacia unueco, pri kiu la aŭtoritatoj kaj diplomatoj konstante alvokas.

f. Esp.o manifestas sian nerefuteblan taŭgecon al la ĝenerala publiko.

Partoprenante ĉi tiun vojaĝon vi do profitas ekonomie, vi praktikas Esperanton kun eksterlandaj samideanoj, vi propagandas Esperanton kaj dum la tuta vojaĝo vi estas en vere internacia rondo familia.

I.T.C. Internacia Turismo Centro, Aerodromo *Schiphol* (konstruaĵo 114, ĉambroj 101, 105-107), Nederlando.

UNESCO-novaĵoj

Poliglota vortaro por bibliotekistoj

Multlingva vortaro el Budapeŝto provizos al bibliotekistoj kun limigita scio pri fremdaj lingvoj tradukojn de la teknikaj terminoj, kiujn ili bezonas por katalogi fremdlingvajn librojn. Titolita «*Dictionarium Bibliothecarii Practicum*», la volumo enhavas ekvivalentojn en dudek eŭropaj lingvoj.

Internacia Muzeo de Ĵurnaloj en Aĥeno

Ĵurnaloj en pli ol 30 lingvoj el multaj regionoj de la tero kaj ankaŭ dokumentoj kun historia kaj kultura valoro troviĝas en la Internacia Muzeo de Ĵurnaloj, kiu en 1963 translokiĝis al nova ejo en Aĥeno (Aachen), Federacia Respubliko de Germanujo.

Fondita en 1899, la Muzeo posedas plurajn eksterordinarajn kaj maloftajn eldonaĵojn inkl. la plej grandan, la plej malgrandan kaj la plej malnovan ĵurnalojn en la mondo.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo

kunvenis en decembro. Kirsten Ek prelegis pri «La Deklaracio de la Homaj Rajtoj» — okaze de la 15-jara jubileo de la decido en UNO.

Tre lerte kaj amplekse ŝi prezentis la evoluon de la ideoj pri la Homaj Rajtoj tra la Angla Magna Charta, la Franca revolucio, Ligo de Nacioj post la unua mondmilito ĝis la grava decido de UNO antaŭ 15 jaroj.

Interligite kun tio ŝi skizis la spiritan evoluon de d-ro Zamenhof de la tagoj kiam li aktive partoprenis la cionistan laboron inter Polaj kaj Rusaj Judoj ĝis li venis al la konvinko ke interkompreniĝo inter la popoloj estas ebla per helpo de internacia lingvo. Poste li plenkore dediĉis sin al la laboro por tiu ideo kaj tre zorgeme evitis ĉiun aktivecon kiu povus malutili al Esperanto, kvankam li, kiel li diris, «ĉiam restis la fidela filo de mia popolo.»

La prelego estis eksterordinare interesa kaj montris flankojn de la vivo de d-ro Zamenhof pri kiuj oni malofte aŭdas.

Post la prelego ĥoro de klubaninoj kantis jenan fanfaron trivoĉe:

Sub verda stel' al nobla cel'
marŝadu ni en harmoni',

kaj ĝin sekvis La Espero kantata de la ĉeestantoj.

Okaze de la jubileo de la Homaj Rajtoj oni decidis sendi salutajn leterojn al UNO, UNESCO kaj Norsk Samband for De forente nasjoner.

La Norda Stelo, Hamar,

aranĝis Zamenhofan festeton en la salono de Odd Fellow 15/12. — Ĉe la festtablo, bele ornamita per verdaj steloj kaj kandeloj, brilaj floroj, la

prezidantino, sino Wærnes, deziris al ĉiuj kaj speciale al la eksterurbaj gastoj koran bonvenon. Lektoro Ruud parolis pri Zamenhof kaj pri la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Sekvis komuna kantado de la Himno.

S-ro Krogstie montris lumbildojn kaj rakontis pri la 15a Kongreso de IFEF en Anglujo la pasintan antaŭsomeron. La sekretariino skribis salutojn al UNESCO kaj UNO okaze de la datreveno de la Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

«*Mara Vento*», *Haugesund*,

okazigis klubkunvenon la 7/11-63. Post kelkaj bonvenigaj vortoj la prez. informis pri nova studrondo kiu eklaboru post la jarfino. Priparolata estis ankaŭ la Esperanto-kongreso okazonta en Hago kaj la eblecoj pri eventuala komuna vojaĝo per aŭtobuso. — Programulo estis Hendry Hermansen kiu ĝojigis la ĉeestantojn per belaj, interesaj kaj instruaj kolor-lumbildoj pri la urbego Chicago kie li loĝis kelkajn jarojn. La lumbildprezenton li akompanis per vivaj priskriboj pri aranĝoj kaj kunestoj de tie loĝantaj norvegoj.

La decembra kunveno estis aranĝata en festa kadro en «Skipperforeningen». Post bonvenosaluto de la prez. oni eksidis ĉe bele ornamitaj festotabloj. Plaĉa programero estis pianmuziko de Gunnar Barane kiu bele kaj sentoplene ludis muzikaĵojn de Grieg. — La kluba filmfotografisto, O. J. Rønnevig prezentis tre belan kaj plaĉan kolor-filmon pri la kongresvojaĝo al suna Bulgario. La interesa filmo konigis al ni partojn el la mirinda kanalarbo Venecio, vidaĵetojn el la plenplenaj jugoslavaj trajnoj, trajtojn el la kongres-urbo Sofio kaj karakterizajn scenojn en la kolora popol-vivo en orient-aspektaj partoj de Jugoslavio, ekz. Sarajevo. Post tre agrablaj vizitoj en Zagreb

kaj Ljubljana loge nin renkontis la ferioaparadizo BLED donante al ni fortan vojaĝemon. Forta kaj meritita aplaŭdo al Rønnevig.

La prez. paroladetiĝis memore al d.ro Zamenhof, kaj la nova s-ano Steffen Kjetland bele recitis «La Vojo»n de Zamenhof. Okaze de La tago de la libro la klubaj komisiulo estis aranĝinta tablon kun esperantaj libroj. — La prez. per kelkaj vortoj memorigis ankaŭ pri la 15-jara jubileo de la deklaro pri la Homaj Rajtoj. Kunlige kun tio estis ekspoziciita la serio de afiŝoj kiun eldonis UNESCO en Esperanto.

La unua kunveno en 1964 okazis 9/1. Novjar-salutis la prez. esprimante la esperon ke la nova jaro iĝu bona kaj prospera por la Esperantomovado. Sekvis klubaj pritraktoj.

Estis priparolata la plano pri skandinavia Esperanto-kongreso en Oslo en 1965, kaj starigo de kontaktoj inter norvegaj Esperanto-kluboj kaj novaj kluboj en Afriko kaj Azio. La ĉeestantoj decidis jese pri kongreso skandinavia kaj estas preta preni sur sin kontakton kun iu klubo afrika aŭ azia. — Ĵurnalisto H. Holst Roness interese paroladis pri muziko donante popularan kaj interesan enrigardon en la mondon de tonoj, kaj skizante en instrua maniero la evoluon de la muziko de la plej frua tempo ĝis hodiaŭ. — Post agraba kafopaŭzo li laŭtleĝis du plaĉajn kaj amuzajn novelojn de la verkistino Ingrid Grieg Cederblad. Estis programo tre ŝatata, kaj oni kore aplaŭdis.

Saŭda Esperantoklubb

kunvenis 19/12. Plurajn cirkulerojn kaj presaĵojn de NEL laŭtleĝis la

prezidanto. Estis multe da ili, kaj post la legado kaj iom da interparolo pri ili ni altablĝis ĉe vere belaspekta kristnasktablo. Nia dommastrino regaligis nin per bongustaj manĝaĵoj kaj kafo. — Fininte la manĝadon ni pritraktis la propagandabonon de Esp.-bladet. S-ino E. Matland promesis kolekti monon de la geklubanoj por mendi la gazeton al diversaj kontoroj tie ĉi, kaj eventuale por aĉeti librojn, se sufiĉe da mono envenos.

La prez. sciigis ke la kliŝoj por la gazeta esp.kurso alvenis. La kurso komenciĝas en la loka gazeto «Ryfylke» tuj post novjaro. (La unua leciono aperis vendredon 3/1.)

Poste la prez. faris enketon inter la ĉeestantoj pri iliaj opinioj pri la enhavo en Esperantobladet. La rezultojn li sendos al la redakcio.

Interŝanĝi bildkartojn kun norvegoj oĝ deziras f.ino Kartanoviĉ Ljiljana, Kneza Miloša 68, Beograd, Jugoslavio.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31.
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 7 27